

Respondo al leteroj venintaj el 41 landoj, 3.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1988 januaro 21 kaj 23

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1988-006/SRI-1988-006-B-6-Claude-kaj-Andree-GACOND-Respondo-al-leteroj-venintaj-el-41-landoj-3.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia. Por la tria semajno ni salutas niajn geaŭdantojn, kiuj skribis el 41 landoj.

El Ĉeĥoslovakio ni ricevis plurajn citindajn leterojn, kiujn ni emas parte legi al vi.

A.- Ni unue salutu Stanislav LINHARI en Pardulice.

Cl.- Eugen MATIRKO en Košice liveras sian homaranisman mondkoncepton en interesa letero, el kiu ni citu eron.

La armigo kaj malarmigo, estas nuntempe la ĉefa temo, pri kiu oni ŝatas la plej ofte disputi. La veraj problemoj, kiuj ŝarĝas la homaron, estas flanken ŝovitaj, aŭ nur malserioze pridiskutataj. Tiel estas do ankaŭ flankenŝovita la problemo de komuna lingvo.

Mi, kiel hungaro, loĝanta sur la vojkruciĝo de la slava kaj germana interesosfero, kaj aldone membro de minorito en Ĉeĥoslovakio, povas la plej bone prijuĝi, kion signifas lingva diskriminigo, rajto pri memdecido, aŭ aliaj rajtoj, tiel klare eldiritaj en la helsinka deklaro. Oni devas rekoni, ke tiu deklaro estis proklamita, precipe por la defendo de malgrandaj nacioj. El vidpunkto de nacia konservo estas do grava - vivgrava demando la internacia lingva idiomio.

Ĉiu homo havas rajton unuavice uzi sian gepatran lingvon. La patrino lingvo estas por ĉiu honesta homo, io plej kara kaj afero sankta. Bedaŭrinde estas la sorto de tiuj milionoj da senhejmuloj, kiuj devis pro diversaj kaŭzoj, forlasi sian lingvosferon kaj serĉi novan hejmon. Kion signifis por ili la problemo de travivo, ĉu ne la alkiŝo al la nova vivmedio? Ĉu ne la eklerno de la lingvo de nova lando estis la unua kondiĉo por la ekzisto? Kiom da milionoj balbutas diversajn fremdajn lingvojn, kaj neniel el amo aŭ simpatia inklino, sed sole el vidpunkto de pura realeco - lerni kaj travivi.

Ĉu ne estas multe pli facila la sorto de unuopulo, devigita forlasi sian hejmon en konscio, ke dise en la mondo oni uzas jam fine, legaligitan kaj ĉie uzeblan internacian lingvon, facile ellerneblan? Ĉu ne devus esti por la Internacia Ruĝa Kruco, por internaciaj religiaj organizaĵoj kaj diversaj internaciaj institutoj, serioze subteni la disvastigon de la uzo de internacia lingvo? La internaciaj rilatoj kun interpretistoj gvidas al nenio. Ĉu ne estas perfekta egocentrismo, partopreni diversajn internaciajn kunsidojn kun aŭskultiloj sur la oreloj? Multe pli saĝaj kaj interesaj estis tiuj antaŭjarcentaj internaciaj koncilioj, ĉe uzo de unu internacia latino.

Tenante antaŭ okuloj nur tiujn kelkajn suprediritajn, el avantaĝoj de unu internacia lingvo, mi povas danke esprimi mian admiron pri via formika laboro, kiun vi de jaroj jam faras por interesoj de Esperanto. Mi pensas, ke la plej bone mi povas rekompenci tiun vian agadon, per mia fideleco, ankaŭ estonte regule aŭskulti la elsendojn de la Svisa Radio Internacia. Via fidela aŭskultanto Eugen Matirko.

A.- Ludmila MINDROVA en Püchov salutis el la 5-a kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

Cl.- Ankaŭ Ladislav ODEHNAL en Osova Bityska.

A.- Ĵiri PATERA en Praha interese skribis pri la urbo Litomyšl. Ni citu erojn el tiu tre interesa letero, kiu komenciĝas esprimante interesiĝon pri la intervjuoj, kiujn ni povis realigi. Ankaŭ pri tiu temo ni citas lin.

Cl.- Ĉiam kun granda intereso mi sekvas viajn intervjuojn kun la Esperanta literatur-fakulo Ed Borsboom, kiu grandan parton de sia aktivado dediĉas al Karolo Piĉ. Plaĉis al mi lia rakontado pri la aŭtoro de la Litomiŝla tombejo kaj pri la urbo Litomiŝl mem.

Litomiŝl ne estas tre granda urbo, sed en nia historio ĝi ludis sufiĉe gravan rolon, ĉar tie vivis kaj laboras kelkaj gravaj personoj de nia lando. Ekz. dum 14 jaroj tie instruis Alois Jirasek, nia granda historia verkisto, tie dum certa tempo vivis ankaŭ verkistino Boĵena Neucova, tie naskiĝis nia granda komponisto Bedrich Smetana, tie naskiĝis kaj vivis verkistino Magdalena Dobromila Rettigova, kiu estas ĝis nun tre populara ne per siaj rakontoj, sed per sia kuirlibro, kiu guste nun aperis en nova eldono. Ŝi ŝatis grandkvantan kaj malŝpareman kuiradon, ŝiaj receptoj komenciĝas kutime per "Prenu 12 ovojn" aŭ "Verŝu du litrojn da lakto" ktp., tial ĝis nun ekzistas diraĵo "kuiiri laŭ Rettigova", kiam temas pri grandkvanta kuirado por malmultaj personoj. En Litomyšl vivis ankaŭ alia verkistino Tereza Novakova, tie naskiĝis verkistoj Viktor Kamil Jerabek kaj lia filo Ĉestmir Jerabek, tie naskiĝis germana-ĉeĥa literaturkritikisto Hubert Gordon Schauer. Litomyšl estas naskiĝloko de prof-o Zdenek Nejedly, elstara muzik-kaj kultur-historiisto, posta ministro de edukado. Tie naskiĝis ankaŭ la ĉeĥa kaj Esperanta poeto Ĵiri Karen kaj ankaŭ nia Esperanta poeto kaj verkisto, akademiano Karolo Piĉ. Litomyšl do estas siaspeca elstara loko de nia lando. (Ne parolante pri tio, ke ĝi troviĝas eĉ inter la t.n. "elektitaj vortoj" kiujn devas ellerni parkere ĉiuj ĉeĥaj lernantoj: temas pri proks. cent vortoj, en kies radiko estas skribata -y- (ipsilono) post la t.n. ambiguaj konsonantoj, kiuj estas b, f, l, m, p, s, v kaj z)

Estimataj samideanoj, mi deziras al vi multajn sukcesojn en via peresperanta kaj poresperanta radio-laboro, kaj al ni, aŭskultantoj, mi deziras pli longajn kaj ĉiutagajn esperantlingvajn programojn de la Svisa Radio Internacia.

Kun samideanaj salutoj, Ĵiri PATERA

A.- Daŭre el Ĉeĥoslovakio salutis František STEJSKAL en Osek.

Cl.- Vlastislav ZAZVORKA en Praha, kiu estas emerita direktoro de Nacia Muzeo.

A.- Kaj Karol ZIPSER en Ĉeski Teŝin.

Cl.- Kaj nun ni saltu al Ĉinio

Skribis Riĉjo HOWARD en Tonqhva, kiu instruas en porinstruista lernejo. Li diras, ke niaj elsendoj estas aŭdeblaj preskaŭ perfekte en Ĉinio.

A.- El Danlando salutis Axel FAUSING en Randers.

Cl.- La venontan semajnon ni daŭrigos nian salutadon de niaj skribemaj geaŭdantoj el 41 landoj.

Parolis nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond, kiuj diras : Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*